

Kolektiva ago

Nuntempe homoj tro ofte kredas ke unu ĉiam agas surbaze de siaj propraj celoj kaj ke majoritato ĉiam havas pli fortan voĉon ol minoritato en demokratiaj landoj. Feliĉe tio ne ĉiam veras.

„Kolektiva ago“ reprezentas agadon de grupanoj kiuj laboras kune por atingi komunan celon. Kiam oni agas sole estas vere malfacile ŝanĝi „Status quo“. Estas tro koste energie, tempe kaj finance. Per kolektivaj agoj vi povas ne nur uzi sciojn kaj kapablojn de diversaj unuopuloj kaj cerbumi pli riĉe, sed ankaŭ disdividi la taskojn, financadon kaj energipostulojn inter pluraj homoj. Tiel la agadforto de individuoj ne nur aldoniĝas, sed multobligas.

Kolektiva ago interesas homojn de diversaj fakoj: politologio, sociologio, psiĥologio, ekonomio, ktp. Por doni ekzemplon, unu el la plej konataj politikaj kolektivaj agoj estas gresradika kampanjo (Grassroot campaign) kiu specialiĝas en personaj kampanjoj (facio al facio) por politikaj partioj.

Por ni la plej interesa povus estis la socia teorio kiu diras, ke homoj ekagas kiam sentas subjektivaj malavantaĝoj kiuj povas (sed ne devas) rilatiĝi al objektiva socia realeco. Kolektiva ago okazas surbaze de tiuj ĉi 3 kriterioj:

- **Perceptita maljusteco** – Grupaj emocioj alvenantaj de perceptita maljusteco (ekzemple kolero) donas motivon por kolektiva agaro por malaperigi la ekzistantan deprivon.
- **Perceptita efikeco** – kredo je forto de grupa agado instigas nin aliĝi al tiu grupo por atingi komunan celon.
- **Socia identeco**

Bona ekzemplo de socia kampanjo estis ekzemple vegana kampanjo uzanta teĥnikon “pago kontraŭ spektado”, proponante konsumi videon kontraŭ donaco de unu eŭro. Post spektado de emociiga video pri kruelaj mortigmanieroj de bestoj kiujn ni preskaŭ ĉiutage manĝas oni demandas ĉu ili preferas donaci la eŭron al la vegana movado kaj ĉu ili deziras pli da informoj pri tio kion ili spektis.

Do, dum nia trejnado ni ankaŭ demandis al si mem “Kion ni povas fari por Esperanto?”. Kaj ni pridiskutis multaj emocijplenajn kazojn kiujn ni povus disvastigi. Ekzemple:

Metoj agadoj
tra multaj
lokoj por divastigi
esperanton

montri Esperanton al
kompari ilin al eventoj ...
!logotipo!

fari socian
agadon kun la bone
kun ne E-organizoj
montrante, ke E-stoj
mojosa.

fari kursojn
pri malferma kaj
senperforta komunikado

ORGANIZI KURSOJN

ĉiusemajnaj
diskutgrupoj

DIVASTIGI
poemojn, mallongajn libretojn...

Pli ol trudi Esperanton,
montri ke la movado
enhavas mojosajn homojn.

Taka agado per Esperanto

Prelegi ekster Esperanto-kunfesto

